

# BULTENO

GERMANA  
ESPERANTA  
FERVOJISTA  
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung  
deutscher Eisenbahner-Esperantisten  
im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 3

Majo/Junio/Julio 1972

## Fervojista printempo

### Nia 24a kongreso en Lugano


Tiĉino, unu el la 20 svisaj kantonoj, la 6an de Majo kun afabla sunrideto akceptis la 24an kongreson de IFEF en sia iama ĉefurbo Lugano. Ofte oni nomas Svislandon malgranda Eŭropo, ne malprave. Tiom da malsamaj lingvoj, popoloj kaj interesoj solidarece tolereme kunvivas en tiu ĉi ŝtato. Ĉu tre taŭga situacio por IFEF, impone demonstracii, eĉ nur sur fervojfaka tereno, pli vastan Eŭropon kun 660 reprezentantoj el 18 landoj?

Kiu antaŭjuĝis, ke en tia lando, anticipe plurlingva, Esperanto-kongreso ne trovas dezirindan atenton, tiun konvinkis pri kontraŭo multaj gazetraportoj, pluraj radiointervjuoj kaj ĉefe la televizia teamo, kiu sekvis la kongresajn aranĝaĵojn fakajn kaj kulturajn, por kiel eble plej objektive informi la loĝantaron pri celoj kaj laboroj de nia kongreso. Memore la adiaŭajn vortojn de la IFEF-prezidanto, ke „informado estas ĉio“, la partoprenantoj

de la 24a, inter ili 120 aliĝintoj el GEFA-teritorio, ĉeestis modelan manifestacion. Al informado kontribuis ne laste la ampleksa librostando, la poŝtgiĉeto en la kongresejo, la tekstrubandoj, la flagoj kaj multnombraj afiŝoj ĉie en la urbo.

Akurateco regis la interese kompilitan programon, pripensitan ĝisdetale dank' al la sindonemaj organizantoj, malgraŭ antaŭaj duboj, kaj timetoj pro diversaj obstakloj kaj la vere ne tre longa prepar-tempo por tiu ĉi kongreso, kiu ja devus esti okazinta en Prago. El la malgrandaj agrabloj i. a. menciindas trovi akceptejon preskaŭ apud la trajno, bonvenis la utilaj indikoj pri trafiko kaj manĝejoj kaj gravis la por kongresanoj senpage uzeblaj enurbaj trafikiloj. Sabaton la aŭtobus-kontrolistoj ankoraŭ suspekteme esploris la verdan kongreskarton; jam dimanĉon ili afable gestis vidante nur la IFEF-insignon.

Kiel ofte, de la interkona vespero multe profitis la ĉirkaŭkongresejaj restoracietoj,



Monte San Salvatore • fama simbolo de Lugano



kie komforte kaj trankvile kunestis malnovaj geamikoj. Dume en la frue malpleniĝanta kongressalonego kelkaj emocioj revidaj dronis en bonvolemo de cetere bona orkestro kaj ties amplifikatoroj.

Amika atmosfero regis ankaŭ lundon en la italrenesanca, iama registaropalaco, kiam la nuna dommaestro, la urbestro de Lugano, gastigis centon da gekongresanoj. Ne mankis ĝentilaj vortoj kaj abunda regalo. Nur fotistoj plendis pri nekongvena bildformato de la ceremonio en tiu longeca vestiblo. Alia fotisto, komisiita pri la oficiala kongresfoto, tute ne vidiĝis sin. Sed la atendantaj kongresanoj bonhumore perceptis la programindikon „komuna fotografado“ tute laŭvorte kaj komune, reciproke sin fotografadis.

La solenon de la malfermo ombrumis ĵusa, subita morto de la ŝatata LKK-ano Giovanni Sasselli, kiu ĝis lasta vivohoro estis dediĉinta siajn fortojn al la sukceso de tiu ĉi kongreso, pro kio la gekolegare dankeme honorigis lin per sincere sentita lasta saluto. Ĉiuj reprezentantoj, ankaŭ la oficialuloj el fervojo, sindikatoj kaj politika administracio uzis la Internacian Lingvon. IFEF-prezidanto Gießner koncize skizis novan stilon de propagando, analizinte la hodiaŭan situacion de Esperanto. Oni jam ne priridas, sed pli kaj pli respektos ĝin kiel solvon sen alternativo de evidentiĝanta lingva problemo, se ni prudente informas kaj konvinke prezentas ĝin.

Digne kadrumis la solenaĵon Fervojista Muzikistaro Bellinzona, kiu saman dimanĉon vespere aŭdigis tre aplaŭdatan koncerton, kaj eĉ la posttagmezan ekskurson sur la Lago de Lugano akompanis per gajaj melodioj. Pluva torento kelktempe malplenis la eksterajn ŝipobenkojn, kio iom memorigis pri la 7a kongreso, kiam sur la Lago Zuriga la ekskursantoj sin ankaŭ sentis foje kiel fiŝoj en baseno. Malserena cielo neniel influis la etoson inter la ekskursantaro, malgraŭ la diversaj intereso, kiuj dividis la grupojn dum la unuhora halto en Morcote, nomata Perlo de la Lago. Ĉu sin klerigi per historiaj studoj en la pitoreskaj stratetoj, ĉu ascendi al la montpreĝeja teraso por vidi laŭdire belan panoramon, ĉi-tage certe grize vualitan? Tuj ĉe la haveno logis budoj kaj butikoj apud lagoborda promenejo. Sed oni povis ankaŭ simple sidi sub la arkajoj kaj, ĝuante sian Capucino-n, trankvile observi la tutan aferemon turistan.

Balvespero kronis la kongresan lundon, laborplenan por estraro, komitato kaj komisiojn. Aliajn kongresanojn invitis la ĉarma ĉirkaŭaĵo de Lugano, promenadi laŭ la lago aŭ konkeri funikulare la apudurbajn montojn Brè kaj San Salvatore. Sur la 1700 m s. m. altan Monton Generoso kondukis mardon posttagmeze komuna ekskurso. En 45 minutoj de apudlaga somero al fruprintempa neĝo, tio ĝenis leĝere vestitajn vojaĝantojn, pro kio dum reveturo la fermitaj vagonoj de la dentrada fervojo kredeble estis multe pli plenaj ol la netegitaj. Aŭtostopi estas ŝatata migromaniero de junuloj; sed trajnstope oni vidis unuafoje vojaĝi ĉ. kvaronon de la ekskursanoj ĉe la deklivoj de l'Monto Generoso, post nevola fervojfaka demonstrado de brulanta lokomotivomotoro.

Sendube en tiu ĉi kongreso dominis la fervojfaka demonstracio. La Terminara Komisiono nunan fojon sen urĝo povis diskuti siajn planojn kaj proponojn. En la kutime malgranda kunveno de la Fakprelega Komisionon i. a. estis diskutataj nova regularo, individuaj gvidlinioj kaj ankaŭ jam la prelegotemoj por 25a IFEF-kongreso kaj por la Universala en Beograd. La kongreslibro publikigis pli ol 10 fakartikoletojn. Ĉeftemo de la 24a estis la centra problemo de la eŭropa transalpa trafiko, la transito en la koro de Eŭropo, la „Gothard-linio“, kaj ĝin oni renkontis en multaj programeroj. La prelegon de A. Eggermann pri konstruado, historio, politiko kaj estontaj projektoj de la Gothard-Fervojo parolis G. Ritterspach.

Unu filmo montris la trafikekonomian signifon de tiu linio, alia la baraktadon kontraŭ la naturo dum neĝo kaj frosto, ŝtonfaloj aŭ akva torento. Konvena kadro por la prezentot estis la Teknika Universitato, moderne ekipita domo, iom for de la urbocentro. Konstatinde, eĉ se oni subtrahas la nombron de tiuj partoprenantoj, kiuj vere nur „parton“ prenis, por dediĉi pli da tempo al la belega panoramo desur la prelegejaj terasoj, tamen restis ankoraŭ preskaŭ 300 kongresanoj, kiuj kun intereso sekvis prelegon kaj filmprezentojn.

Du ekskursoj profundigis la fakscion pri la sama temaro. Sepdeko da interesuloj ne bedaŭris sian viziton al unu el la plej modernaj ranĝostacioj, kiun trapasas ĉ. 2400 vagonoj tage. Kiel limstacio kaj samtempe finpunkto de la Gothardlinio Chiasso havas apartan pozicion en la transalpa kaj trasvislanda transito. Sam-



tempe kondukis alia ekskurso al la SBB-ĉefriparejo Bellinzona, kies elstara tasko estas la riparado de la specialaj lokomotivtipoj funkciantaj sur la Gothardlinio. Ankaŭ Bellinzona valoras viziton, pensis multdeko da „fakaj“ ekskursintoj, kiuj pretiĝis survoje de la stacidomo al la riparejo, kie laŭdire kun miro oni konstatis, ke el ĉ. 200 aliĝintoj alvenis nur malpli ol la duono. Speciala trajno veturigis vendredon frumatene la kongresanojn laŭ la ĉefa parto de la Gothardlinio. Per laŭtparoliloj en ĉiu vagono oni aŭdis atentigojn pri detaloj, teorie jam konataj el prelegoj, prospektoj, filmoj kaj artikoloj: helicotuneloj, la rulanta ŝoseo, talusoj, diversaj pontoj kaj protektaj konstruaĵoj. El ĉio malgrandan parton posttagmeze oni retrovis en la miniatura Gothard-fervojo de la trafikmuzeo en Luzern.

La ceterajn kongresajn laborojn ankaŭ benis la sukceso. Kaj dank' al la bona preparo de la statutkomisiono necesis ne tiom da urĝemo aŭ eĉ kromhoroj, kiom en Maribor, por fine akceptigi la novan statuton, kiu donos ankaŭ pli larĝan bazon al la faklingva evoluo. La estrarelektaj enoficiigis unu novan kunlaboranton. Kiel vicprezidanto nia nederlanda kolego Wim van Leeuwen okupis la lokon de la eksiganta G. Sredeĉ. La publikaj kunsidoj trovis notindan intereson. Arhus estis definitive akceptata kongresloko por la 25a kaj preparlaboroj jam komenciĝis.

La proksima parko apud la lagobordo ofte permesis freŝigan promeneton dum laborpaŭzoj kaj ankaŭ agrabligis la vojon de la kongresejo al la urbocentro. En tiu malnova kerno de Lugano troviĝas ankoraŭ juveloj de eklezia kaj profana konstruaro. La urba muzeo montris dumkongrese en ekspozicio pri Paul Klee, ties proprajn verkojn kaj tiujn, dediĉitajn al li de geamikoj. La pinakoteko disponas pri abunda privata kolekto, per kiu Thyssen savis multajn milionojn al la sekura Svislando.

Dum diboĉa ge-sido (nepublica) LIFKAU jubileis sian 5-jaran ekziston. En tipe ti-

ĉina restoracieto, kies nomon neniu memoris, sonis festkantoj kun sennombraj katastrofoj. Testo pri rilatoj inter inteligento, sekseco kaj sentemo rezultigis surprizajn konkludojn. Oni aŭdis i. a. pri planoj instali terminaran komisionon.

Triparta teatroprogramo, impresprezentita de la Bulgara Esperanto Teatro estis kultura kulmino, kiun la kongreso travivis merkredon vespere. De Ĉeĥov, ĉiam bonevena komediisto, oni vidis plezurigan spektaklon „La Urso“. Pli pretendema estis la dialogo inter G. B. Shaw kaj Patricia Campbell „Kara Mensoganto“ verkita laŭ leteroj de ambaŭ. Malstreĉis fine la amuza skeĉo „Divorco“, per sama ĉarmo kaj aktiva lerteco.

Jaŭdon plaĉis la folkloro vespero. La disipline demonstritaj gimnastikaj ekzercoj de knaba grupo tiel apartenas al svisa medio, kiel la kolore kostumita flagosvingisto el Graubünden, kiu dum la obtuza pramuziko de alpkorno siajn variajn figurojn montris. Ankaŭ la kant-kaj danĥoroj en tiĉinaj kostumoj rikoltis multan aplaŭdon. Hans Hermann reĝisoris, amuzis per ŝercoj, ventre parolis, sorĉis iluziojn, tiel senlace ne lasante paŭzon por enuo.

Finis la unusemajnan kuneston memorinda tago kun vojaĝo tra la Gothard-tunelo, ŝipveturado dum ventego sur la Kvarkantona Lago, kolbaso-bankedo kun glaso da bona vino en gaja rondo surŝipe, la ĝisrevido-vortoj de la prezidanto, ĉi-foje „Solena Telefermo“ per laŭtparoliloj en ĉiuj ŝipsalonoj; la iluzia spireto de interstela flugado kaj la aliaj demonstroj en la planetario de la trafikmuzeo Luzern, akompanitaj de bone parolataj esperantlingvaj klarigoj, la iom-post-ioma disiĝo de grupetoj en la muzeo, en la aŭtobuso, en la stacidomo, tio ĉio kaj tia abundo da impresoj ne lasis lokon al kongresfina emocio.

De pluraj geamikoj ni kvin fojojn adiaŭis kaj — denove renkontis ilin ĉe proksima stratangulo. Sed fine postrestis tamen nur ankoraŭ du tuketoj salute svingataj dum vespera krepusko en la stacia halo de Luzern. wbr

## Feriosemajno en Nederlando

Inter la 9a kaj 16a de septembro 1972 okazos denove en Wijk aan Zee feriosemajno en hotelo Kennermerduin. Tranoktado kaj manĝaĵo por la tuta semajno kostas 178 hfl kaj am-

pleksas 7-tagan restadon en la hotelo, la autobus-ekskursojn, ŝipveturon kaj diversajn enirprezojn. Pliajn informojn donas la organizanto Thies M. Blaauw, Grenslaan 28- Zwolle/Nederlando. Bonvolu aldoni respondkuponon por la respondo.

## Eŭropa Esperanto Konferenco

La aŭstria Esperanto-movado organizas ĉijare en Wien, Eŭropan Esperanto-Konferencon kun la unua Esperanto-Filmfestivalo de la 23a ĝis 30a de julio. Petu informojn de: Aŭstria Esperanto-movado, Hofburg, A-1010 Wien.



## La Gothardfervojo

**fakprelego prezentita dum la 24a kongreso de Internacia Federacio Esperanta Fervojista**

verkis: Anton Eggermann, Luzern, SBB;

### RESUMO

Pasaĝero ĝuanta la pejzaĝan belecon de la Gothard-linio apenaŭ meditas pri la politika ŝarĝo, kiun ĝuste tiu ĉi alpotransverso donis al Svislando. Jam la konstruo de la nomdona kapelo dediĉita al Sankta Godehardus sur la supro de la montpasejo en la 12a jarcento estis politika demonstracio, direktita kontraŭ la potencopretendoj de la romi-germana imperiestro Frederiko Barbarossa.

Malrapida evoluo de mulvojo al grava trafikstrato daŭris, ĝis fervojaj inĝenieroj komencis novan eraon de transalpa transporto per funkciigo de la Gothard-Fervojo en la jaro 1882, utiligante tiun ĉi konstruadon antaŭis jam de 1853 plana-topografie plej ekonomian linion. La ekdoj, intertraktoj kaj fine ratifikoj de ŝtatkontraktoj kun Italio kaj Germanio; potencpolitikaj pretendoj de eksterlando kaj ekonomiaj interesoj intersvisaj bezonis ekvilibrigon. La Haaga Packontrakto aparte valorigis la neŭtralan pozicion de la Gothard-Fervojo dum la du mondmilitoj. La speciala situo de la Gothardlinio promesis samtempe al Svislando garantian pri ĝia neŭtraleco meze inter militantaj ŝtatoj kaj certigis al ĝia popolo relative bonan provizadon pri vivnecaj objektoj.

Unu premison por la tiam revolucia tranĉo tra la alpoĉeno kreis la evoluo de la konstruteknikaj ebloj. En la jaro 1872 oni komencis topografie adapti tiun ĉi naturevene favoran trafikvojon al la modernaj bezonoj. Krome granda nombro da tuneloj, viaduktoj kaj aliaj pontoj ekonomie kontribuis al konstrua ŝanĝado de vertikalo al horizontalo.

La enkonduko de elektra trakcio jam ĉ. 1920 kaj plimultigo de bloksekcioj kun

## Die Gotthardbahn

**Fachvorlesung, vorgetragen im Mai 1972 auf dem 24. Kongreß des Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Verbandes.**

Verfasser: Anton Eggermann, Luzern, SBB

### Zusammenfassung

Der Reisende, der sich an den landschaftlichen Schönheiten der Gotthard-Strecke erfreut, wird sich kaum einen Gedanken darüber machen, wieviel politische Belastung gerade diese Alpentransversale der Schweiz gebracht hat. Schon der Bau einer Kapelle am Scheitelpunkt des alten Paßweges, die, im 12. Jahrhundert dem hl. Godehardus geweiht, diesem Alpenpaß seinen Namen gab, war eine Demonstration gegen die Machtansprüche des deutsch-römischen Kaisers Friedrich II. Barbarossa.

Die allmähliche Entwicklung vom Eselspfad zu einem wichtigen Verkehrsweg dauerte an, bis Eisenbahningenieure im Jahre 1882 mit der Inbetriebnahme der Gotthardbahn eine neue Ära des alpenüberquerenden Transportes einleiteten, indem sie sich diesen topographisch wirtschaftlichsten Weg zunutze machten. Dem Baubeginn gingen schon seit 1853 Planungen und Verhandlungen voraus, die endlich zu Staatsverträgen mit Italien und Deutschland führten; machtpolitische Ansprüche des Auslandes und wirtschaftliche Interessen im Schweizer Inland waren auszugleichen. Der Haager Friedensvertrag wertete während der beiden Weltkriege die neutrale Stellung der Gotthardbahn erheblich auf. Die besondere Lage der Gotthardstrecke versprach der Schweiz gleichzeitig eine Garantie ihrer Neutralität mitten unter kriegführenden Staaten und sicherte ihrer Bevölkerung eine verhältnismäßig gute Versorgung mit lebensnotwendigen Gütern.

Eine der Voraussetzungen für den damals revolutionären Schnitt durch die Alpenkette war die Entwicklung der bautechnischen Möglichkeiten. Im Jahre 1872 wurde begonnen, diesen naturgegeben günstigen Verkehrsweg topographisch den modernen Erfordernissen anzupassen. Auch eine große Zahl von Tunneln, Viadukten und anderer Kunstbauten tragen in wirtschaftlicher Weise zu einer baulichen Umwandlung der Vertikalen in die Horizontale bei.

Die Einführung der elektrischen Zugförderung schon um 1920 und eine Vermehrung der Blockabschnitte mit z. T. auto-



parte aŭtomataj instalaĵoj ebligis pli densan trajnsinsekvon. Anstataŭ 20 potage en 1882 hodiaŭ pasas pli ol 200 trajnoj potage la Gothardlinio.

Depost 1888 oni utiligis la eksterordinarajn cirkonstancojn de tiu ĉi linio al internaciaj bremsprovadoj, tiel esplorante la diversajn sistemojn por fiksi ankoraŭ hodiaŭ validajn normojn. Fakuloj opinias, ke bremsistemoj sukcese ekzamenitaj ĉi tie, taŭgas por ĉiuj montarlinioj en la tuta mondo. Ankaŭ por testi diversajn reltipojn internacia komisiono de spertuloj trovis idealajn kondiĉojn sur la Gothardlinio.

Plukonstruado kaj modernigo de trakaro, stacioj kaj teknikaj instalaĵoj ne ĉesas ekde la unua funkciigo; kaj jam oni planadas laŭ supozata trafikvolumeno en 1990, projektante i. a. plivastigon de flanklinioj kaj ĉefe la 45,5 kilometrojn longan t. n. bazan tunelon, situantan 600 metrojn sub la unua Gothardtunelo por sume ĉ. 1800 milionoj da svisaj frankoj.


wbr.

matischen Einrichtungen ermöglichen eine dichtere Zugfolge. Statt der 20 Züge täglich im Jahre 1882 passieren heute jeden Tag über 200 die Gotthardstrecke.

Seit 1888 macht man sich die außergewöhnlichen Verhältnisse dieser Linie für internationale Bremsprüfungen zunutze, indem man die verschiedenen Systeme erprobt, um die noch heute gültigen Normen festzulegen. Fachleute glauben, daß die hier erfolgreich geprüften Bremsysteme für alle Gebirgsstrecken der Welt brauchbar sind. Auch zum Testen verschiedener Schientypen fand eine internationale Kommission auf der Gotthardlinie die idealen Voraussetzungen. Ausbau und Modernisierung des Schienenweges, der Bahnhöfe und der technischen Einrichtungen hören nicht auf seit Inbetriebnahme; schon plant man für das mutmaßliche Verkehrsaufkommen von 1990, projektiert den Ausbau der Zufahrtlinien und vor allem den 45,5 km langen Basistunnel, der 600 m unter dem jetzigen Gotthardtunnel liegen soll und auf ca. 1800 Millionen SFr. veranschlagt wird.

## Distriktkomisiito en Saarbrücken

Fine de la jaro 1958 hazarde mi trovis lernantogazeton kun presita Esperantorapidkurso. Mia intereso kreskis, leginte komence de la jaro 1959 pri Esperanto-kurso anoncita en la oficiala informilo de la DB-distrikto Saarbrücken. Tuj mi anoncis min. La iama distriktkomisiito BOR Winkelhaus instruis Esperanton por komencantoj. Multaj interesuloj frekventis la kurson, sed post mallonga tempo malkreskis la intereso, ĉar la plej multajn kursanojn ĝenis streĉa lernado dum ilia libertempo. Kun mia filino Birgitta mi partoprenis ĉiujn lecionojn ĝis kursfino. Okaze de GEFA-jarkunveno 1960 en Trier ni ambaŭ sukcesis en la kapablecoekzameno. Iomete pli mafrue mi transprenis la postenon de distriktkomisiito el la manoj de BSW-estraro Saarbrücken. Ek de Dortmund mi



Alois Hauptenthal

vizitis ĉiujn GEFA-jarkunvenojn, en 1966 kaj 1972 IFEF-kongresojn en Utrecht kaj Lugano.

Intertempe la Internacia Lingvo estas parto de mia familia vivo. Mia filo Reinhard lernis 17jaraĝa Esperanton kun multe da sukceso. Post la ekzamenoj kapableca, kursgevidanta kaj internacia li eldonis librojn, publikiis nacie kaj

internacie pri la Internacia Lingvo, recenzis librojn, intervjuis lin radio kaj televido. Li posedas propran bibliotekon kun pli ol mil libroj. Ĝis 1971 li funkciis kiel UEA-ĉefdelegito.

Mi estas feliĉa, ke Esperanto vivas kaj vivos en la familiaj rondoj hodiaŭ, en la venonta generacio kaj jam ankaŭ en la posta.

## Jahresversammlung

Die 16. Jahresversammlung unserer Vereinigung findet in Clervaux (Clerf) — Luxemburg — vom 6. bis 9. Oktober 1972 statt. Wir bitten schon jetzt, diesen Termin für unser traditionelles Herbsttreffen, erstmals in Verbindung mit den belgischen und französischen IFEF-Landesverbänden, freizuhalten. Weitere Informationen bringt Bulletin 4/72. Anmeldevordrucke sind, wie üblich, ab August bei den Bezirksbeauftragten erhältlich.



## Aus den Gruppen

### Münster/Vestfalia

#### Nia ĉi-jara majoekskurso

Ankaŭ dum ĉi-tiu jaro la Esperanto-grupo Münster/Vestfalia daŭrigis sian tradicion, okazigi majoekskursion kune kun la Osnabrücka Esperanto-grupo. Sed ankaŭ Esperantaj geamikoj el Hamm/Vestfalia, Herber kaj eĉ el Hengelo (Nederlando) partoprenis. Sufiĉe granda anaro — certe la duono estis junuloj — ekmigris de la stacidomaplaco en Rheine. Baldaŭ ni estis ekster la urbo. La vojo kondukis nin tra bela pejzaĝo. Ĉie la nova verdaĵo komencis elkreski. La birdoj kantis en la arboj, tiel ke estis ĝojo, esti en la printempa naturo. Nian unuan paŭzon ni faris sur monteto, de kiu ni havis bonan superrigardon al najbaraj vilaĝoj. Babilante kaj kantante ni manĝis kunportitan panon. Je la tagmezo ni estis en Haŭenhorst, kie ni vizitis gastejon en la proksimeco de la stacidomo. Nia lasta vojo kondukis nin tra pejzaĝo, kie parte la arbaro estis elradikita pro fari spacon por novkonstruitaj domoj. Bedaŭrinde per tiaj agadoj la bela origina pejzaĝo malaperas pli kaj pli.

Je la celo de nia migrado en Mesum ni havis ankoraŭ tempon por restadi. Poste ni veturis trajne parte al la norda, parte al la suda direkto hejmen.

Ĉar ankaŭ la vetero estis bela, ni volonte konstatas, ke denove nia majoekskurso estis sukceso.

JS

### Nürnberg

Über 60 Esperantisten folgten der Einladung des Leiters der Esperanto-Presseagentur, Herrn Ludwig Pickel, Nürnberg, an die

Sprachfreunde von Nordbayern, am 27. 2. 1972 in die Meistersingerhalle nach Nürnberg zu kommen. Groß war auch die Teilnahme unserer Eisenbahneresperantisten der BDen Nürnberg und Regensburg.

Während Herr Pickel, der seit Jahren engen Kontakt zum Radio Warschau, Abteilung Esperantosendungen, hat, über seine jüngste Reise dorthin berichtete und man einen Bericht des Senders in Esperanto hörte, der sich auf unsere Zusammenkunft bezog, zeigte der Bezirksbeauftragte der BD Nürnberg Diapositive unserer Kongresse in Rimini und Maribor. Da sich noch während der Vorführung fünf Teilnehmer für unseren Kongreß nach Lugano anmeldeten, darf angenommen werden, daß der Vortrag einen guten Eindruck hinterlassen hat.

Nach einer Schmalfilmvorführung über die Kongresse in Wien und Nürnberg, beschloß man bei gemütlichem Beisammensein, sich Ende April in Kronach wieder zu treffen. Die Eisenbahneresperantisten der BD Nürnberg sprachen den Wunsch aus, im Frühjahr 1972 einen Ausflug nach Rodach bei Coburg zu machen.

Müller

### Wuppertal/Hagen

#### Botschafter vom fünften Kontinent bei den Eisenbahner-Esperantisten zu Gast.

Nachdem er bereits vor einigen Monaten die ersten Kontakte zu den Eisenbahner-Esperantisten in Rosenheim anknüpfte, besuchte der australische Botschafter in Bonn, Ralph Harry, auf Einladung der GEFA-Gruppe Hagen am 23. 4. 1972 die Esperantisten Nordrhein-Westfalens.

Bereits am Vortrag machte

der Westdeutsche Rundfunk in seiner Sendung „Westfalen-Echo“ auf den bevorstehenden Besuch aufmerksam. U. a. wurde über den Plan des Botschafters positiv berichtet, zu den Olympischen Spielen in München ein Esperanto-Wörterbuch für Sportler zu verteilen.

Rat und Verwaltung der Stadt Hagen benutzten die Gelegenheit, den Botschafter und seine Gattin zum Empfang ins Rathaus einzuladen. Zahlreiche Pressevertreter und eine Abordnung der Eisenbahner-Esperantisten des Bezirks Wuppertal waren ebenfalls Gäste des Oberbürgermeisters.

Der Botschafter verwies auf die freundschaftlichen Beziehungen zwischen seinem Heimatland und der Bundesrepublik sowie auf die mannigfaltigen kulturellen und wirtschaftlichen Verbindungen. Besonders erwähnte er die Bedeutung der internationalen Sprache. Die Vertretung der Stadt war sichtlich überrascht, daß Rede und Gegenrede ohne den vorsorglich bestellten Dolmetscher der englischen Sprache geführt werden konnte. Nach dem Austausch einiger Geschenke trat sich Ralph Harry in das Goldene Buch der Stadt ein.

Mehr als 200 Esperantisten erwarteten den Botschafter und seine Gattin anschließend im Veranstaltungssaal der Kaufmannsschule. Nach den Grußworten eines Vertreters der Gruppe Hagen und des Bezirksbeauftragten für den Bereich der BD Wuppertal richtete Abteilungspräsident von Kirchbach seine Grußadresse, auch namens des Präsidenten der BD Wuppertal und des Vorsitzenden des Bezirksvorstandes des BSW, an den Ehrengast,



seine Gattin und den überraschend großen Teilnehmerkreis, zu dem auch der Beauftragte für kulturelle Angelegenheiten des BSW Wuppertal sowie GEFA-Vorsitzender Brandenburg mit Familie, fünf Esperantofreunde aus den Niederlanden und GEFA-Mitglieder der Bezirke Essen, Köln, Münster und Nürnberg gehörten. Grußbotschaften aus zahlreichen Städten der Bundesrepublik, der CSSR, Jugoslawiens und Schwedens wurden erwähnt. — Einige Tage später gingen noch Grußadressen der Vizepräsidentin des Deutschen Bundestages, Frau Liselotte Funcke und des MdB Lothar Wrede in Hagen ein. —

Filme über Australien und seine Hauptstadt Canberra

versah unser Gast mit vorzüglichen Kommentaren.

Den Abschluß bildete ein Farbfilm über die australischen Eisenbahnen. In der anschließenden regen Diskussion, die Ralph Harry zu seiner Entlastung ausschließlich in Esperanto führte — H. Merkens dolmetschte den geladenen nicht Esperanto sprechenden Gästen — verschafften sich die Teilnehmer weitere Einblicke in die Geschichte und die Lebensart der Bewohner dieses für uns weitest entfernten Erdteils, dessen Bewohner zu 98 Prozent europäischer Abstammung sind. Als Ausdruck des Dankes überreichte Fritz Nickel unserem Gast zur Erinnerung einen Wandteller, verziert mit Stadtwap-

pen und Esperantostern und der Inschrift „Reloj interligas la landojn — Esperanto la popolojn“ (Schienen verbinden die Länder — Esperanto die Völker), sowie einen Bildband über die Deutsche Bundesbahn.

Zu einem Umtrunk trafen sich die Esperantisten mit ihrem Gast nochmals im Ratskeller. Meinungen und Erfahrungen wurden ausgetauscht. Der inzwischen eingegangene Dankesbrief gibt uns die Gewißheit, daß es unserem Gast und seiner Gattin in Hagen gut gefallen hat.

Die Presse berichtete über die bisher größte Veranstaltung von Esperantisten — und über Esperanto — in Hagen hervorragend.

Graß



**Akcepto en la urbdomo, de maldekstre:  
Hermanns, Ralph Harry, VPr von Kirchbach, Grass**

### **Esperanto-poŝtmarko en USONO?**

Dank' al klopodoj de individuaj esperantistoj, la usona instanco, kies tasko estas decidi pri eldono de poŝtmarkoj, nuntempe konsideras la proponon pri speciala poŝtmarko okaze de la 57a UK de Esperanto.

### **Esperanto-Weltkongreß**

Der 57. Esperanto-Weltkongreß findet im Jahre 1972 in Portland, Oregon, statt. Dies ist das zweite Mal, daß ein Esperanto-Weltkongreß in den Vereinigten Staaten abgehalten wird. Aus Hamburger Esperanto-Kreisen

ist zu erfahren, daß bereits Vorbereitungen angelaufen sind, den Esperanto-Weltkongreß im Jahre 1974 in Hamburg abzuhalten. Der letzte Esperanto-Weltkongreß in der Bundesrepublik fand im Jahre 1958 in Mainz statt.



## Mitteilungen des Vorstandes

Vorstand, Bezirksbeauftragte und Beauftragte für Sonderaufgaben trafen sich am 15. 4. 1972 zu einer Arbeitssitzung in Frankfurt/Main. Letzte Vorbesprechungen zu dem inzwischen durchgeführten 24. IFEF-Kongreß in Lugano und die für die erste Oktoberwoche geplante gemeinsame Jahresversammlung des deutschen, des französischen und des belgischen Landesverbandes in Clerff (Luxemburg) wurden behandelt.

Werbung neuer Mitglieder, Information und Öffnung nach außen waren die Themen einiger lebhaft diskutierter Tagesordnungspunkte. Bulteno 2/72 ist in einer erweiterten Auflagenhöhe hergestellt worden und soll mit Unterstützung der Vorstände der BSW-Bezirke bei den Vertreterversammlungen zur Information über unsere Arbeit verteilt werden. Ein vom Umfang her reduzierter Nachdruck für gezielte Werbung ist in Vorbereitung. Ein Rückblick auf die erfolgreich verlaufene Skiwoche am Spitzingsee (s. Bulteno 2/72), die Jahresversammlungen der Nachbarverbände, die von GEFA besucht wurden, vermittelten den Teilnehmern einen Einblick in die Probleme und Erfolge anderer angeschlossener Landesverbände. Die Auswirkungen der Organisationsänderungen

in der Mittelinstanz haben sich auch auf unsere Vereinigung ausgewirkt. Nachdem bereits die BD Augsburg in die BD München überführt wurde, hat mit

Ende April d. J. auch der Bezirksbeauftragte für den BD-Bezirk Mainz seine Tätigkeit in diesem Amt einstellen müssen. Für ihre bisherige Mitarbeit wurde den „Pensionären“ herzlich gedankt. Ab Jahresversammlung 1972 werden auch im GEFA-Vorstand und -Mitarbeiterkreis Veränderungen eintreten, die bei der nächsten Jahresversammlung den GEFA-Mitgliedern bekanntgegeben werden.

## Internacia Junulara Renkontiĝo

**Kronach.** Trideko da ĝeĵunuloj partoprenis la internacian junularan renkontiĝon de Germana Esperantojunularan kiu okazis de la 27. 3. ĝis 3. 4. 1972. La programo konsistis el lingvolernado, diskutoj kaj prelegoj kaj ekskursoj. La partoprenantoj faris surstrate enketon pri internacia lingvo inter la loĝantoj de Kronach. Lumbildprelego konatigis la junajn esperantistojn kun la granda filo de Kronach, la pentristo Lucas Cranach, kies 500an naskiĝtagon ĉi-jare la urbo Kronach festas. Pri la renkontiĝo raportis krom la loka gazetaro la regiona programo de la Bavara Radio per intervjuo kun Ulrich Brandenburg. La plej juna partoprenanto al la renkontiĝo sendube estis Thomas Bormann el Hamburgo, filo de la GEA-prezidanto.

Pilo

## Informo

Ciujare la ornitologia rondo esperantlingva (ORE) aljuĝas la premion Simon-

detti en valoro de 1000 bfr = 20 \$ pri la temo „natura“. Kandidatoj por la konkurso 1973 bonvolu peti regularon al la sekretario M. Halvelik, Gebr. Blommestraat 41/0, B-2200/Belgio.

Ab 13. 9. 1972 biletas la VH Schwelm ĵewels miltvokos von 18.30—20.00 Uhr Gelegentheit, im Rahmen eines Arbeitskreises „Esperanto — Lingvo Internacia“ Esperanto-Sprachkenntnisse zu vertiefen. Das Semester umfaßt 13 Abende. Unter Anlehnung an das Lehrbuch für Fortgeschrittene von Georg Streidt, wird der Arbeitskreis von Anton Kronshage, 583 Schwelm, Eulenweg 5, Ruf (0 21 25) 20 24, geleitet, der Anmeldungen gerne entgegennimmt.

## Aranĝo

Kulturaj esperantistoj semajnoj kun renkontiĝo de fervojistoj 2. - 9. 7. 72 en Esperantista Kulturdomo Kastelo Gresillon, F-49 Baugé.

Okaze de 70-jara jubileo de malfermo de la unua Esperanto-kurso en urbo Trojan la societo „Balkana Stelo“ aranĝos fine de aŭgusto Esperanto-ekspozicion. Esperantistoj el la tuta mondo estas petataj sendi diversajn esperantaĵojn aŭ gratullitrojn. Ĉiu kontribuanto ricevos bildkarton.

Adreso: Esperanto-Societo „Balkana Stelo“, poŝtkesto 90, Trojan, Bulgario

**Redaktfino por n-ro 4 estas la 20an de aŭgusto 1972.**